
# STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1974 8 (46)

František B r a n i s l a v

## Kristnaska

Sonis sonoriloj. Son´ sopirojn vekis :
tuj ekkuri al la naska region´.
Ni sen am´ ne estas. Nek sen la sopir´.
Arbojn ekrevidi dum laŭroja ir´!
Tuj ekkuri al la naska region´,
varmon de la hejm´ ni spiri ekŝategis.

Al la hejm´ reveni tra subneĝa tero,
kie kamproz-bera flamas ruĝdekor´,
kien kuninvitas birdojn frost´, malsat´.
Hejmo, proksimigu tagojn de l´ pasad´!
Por tempet´ ekviolonu al ni rememor´,
kaj sur varma polm´ degelu la neĝero !

Kampojn prisemitajn softaj neĝoj kovros,
vi infanvizaĝon serĉas ĉe la put´.
Super naska land´ sonoru, sonoril´ !
Foje nur reveni al la hejmazil´!
Korojn ho neniam trafu am-ekmut´,
ili je la forto, je tener´ malpovru.

/rojo = rivereto/

Tradukis Jiří Kořínek
27.12.1973

# DO NOVÉHO ROKU

Setkáváme se opět na stránkách Starta, abychom společně zhodnotili uplynulý rok 1974. Byl to, bezesporu, rok pozoruhodný a úspěšný. Tím nemyslíme jen to, že jsme vydali tiskem dvě nové knihy v celkovém nákladu přes 11 tisíc výtisků, čtyři druhy pohlednic a dva druhy odznaků a připravili k tisku samostatné číslo Paca i se separátem, stejně tak jako dvě další knížky, že jsme vydali přes 200 tisíc samolepek pro propagaci esperanta a mnoho dalších drobností a zaplatili za vydané materiály více než 150 tisíc Kčs. To jsou úctyhodná čísla, a kdo ví, co takový výsledek stojí námahy, se nediví, že toho nebylo více. Jen zabezpečit stálý tisk Starta nebylo maličkostí. Přitom rozšiřujeme naše edice o literární almanach PANORAMO a o kvalitnější tisk MEDICINAJ INFORMOJ.

Především si ceníme, že se nám podařilo zkonsolidovat a zaktivizovat všechny naše sekce a komise, které mají rozhodující význam, že se podařilo vtisknout do jejich pracovních plánů jednotný zájem svazu o prohlubování demokratického centralismu a že jejich práce a plán jsou realizací Plánu činnosti svazu.

Ceníme si dále vaší obětavosti a spolupráce i po finanční stránce, vašich rad a kritických připomínek, které nám pomáhají získat přehled o celkové situaci v našem svazu. Ceníme si vzájemně korektních a soudružských vztahů, když máme možnost přijet mezi vás a rozdělit se s vámi o starosti a úspěchy. I když naše kontakty nejsou ještě dost široké a časté, můžeme si i z osobních setkání s vámi učinit určitý obraz o tom, jak jsou přijímány záměry předsednictva svazu.

Celý uplynulý rok jsme se snažili získat co nejširší prostor pro činnost vás všech a svazu zvláště. Snažili jsme se získat politický a společenský kredit a váhu i při mezinárodních jednáních. Myslíme si, že se to z větší části podařilo. Je pravda, že ne všude a ne u každého je naše snaha přijímána stejně a s pochopením. Je také pravda, že ještě ne všichni naši členové, ba ani funkcionáři některých MS či kroužků nám rozumějí v plné míře. Jsme si toho vědomi a víme, že tudy vede pouze jedna cesta : soustavně, věcně, klidně, ale rozhodně vysvětlovat a přesvědčovat. Víme, že se nám takto podaří získat poctivé esperantisty, ať již jsou či nejsou členy svazu.

Nesmíme však zapomínat, že stát bude podporovat esperantské hnutí jenom za podmínky, že toto hnutí bude zcela bezvýhradně a poctivě sloužit naší společnosti, jejím zájmům, že bude aktivní součástí mírové fronty, že bude podporovat mír a socialismus, že bude pomáhat upevňovat internacionální vztahy mezi národy.

Myslí-li si někdo, že esperanto je nějakým kouzelným zaklinadlem pro státní orgány, jež samo o sobě přesvědčí o své nezbytnosti, pak zcela odpovědně a otevřeně říkáme, že takový člověk je idealistický snílek a neodpustitelně naivní fantasta.

Je třeba si říci zcela nepokrytě pravdu, analyzovat skutečnost takovou, jaká je, vyvodit z ní poučení pro naši další práci. Je třeba upustit od zaběhnutých, laciných a neúčinných způsobů přesvědčování nových adeptů, přestat je orientovat na jakési romantické možnosti, vyplývající snad ze snazšího či levnějšího způsobu cestování, dorozumění a dopisování. To snad stačilo před padesáti lety, dnes rozhodně ne.

Je nutné, abyste se ve svých klubech zamyslili nad Plánem činnosti svazu na rok 1975. Byl projednán nejen v předsednictvu a v ÚV ČES, ale i s ministerstvem kultury ČSR. Podle tohoto plánu je třeba rozpracovat náplň činnosti vašich klubů v návaznosti na místní poměry. Je třeba se zaměřit na hlavní akce roku, které svaz bude pořádat společně s určenými místními skupinami. Je samozřejmé, že

vaše činnost bude zapojena do příprav 30. výročí osvobození naší vlasti. Měli byste se spojit s kulturními odbory MNV a MěNV a také s OMR a nabídnout jim pomoc při zajišťování některých akcí, případně připravit vlastní akci - výstavku, přednášku apod. Zajeďte si na výstavy, které by mohly být určitým vodítkem i pro vás.

Vážení přátelé, příští rok je posledním rokem naší pětiletky a rovněž posledním rokem před XV.sjezdem KSČ, který se bude konat v roce 1976. Tento sjezd bude pravděpodobně i mezníkem pro činnost zájmových svazů. Proto i pro nás, esperantisty, musí být příští rok rokem rozhodného nástupu v naší aktivitě, která prokáže, že máme co nabídnout, že můžeme pomáhat a něco znamenat a že je tedy oprávněna existence jak esperantského hnutí, tak i našeho svazu.

Věříme společně s vámi, že naše poctivá práce, upřímná snaha pomoci tam, kde pomoci můžeme, přinese s rozvážným a uvědomělým konáním svoje kladné výsledky.

Děkujeme vám za spolupráci, těšíme se na setkání s vámi, na vaši pomoc a podporu i pochopení a přejeme vám a vašim rodinám či blízkým mnoho zdraví a osobních úspěchů v novém roce.

Josef V í t e k,
předseda ČES

Zdenko K ř i m s k ý
tajemník ČES

# Proksimaj taskoj

La 13-a plenkunsido de CK ĈEA la 30an de nov. en Praha diskutis pri la antaŭstarantaj taskoj de la asocio en 1975. Enkondukis ĝin la raporto de J.Vítek,prez.de ĈEA. Inter la taskoj estas precipe la solenaĵoj de la 30a datreveno de liberigo de Ĉeĥoslovakio far Soveta Armeo. La raportinto akcentis neceson popularigi la partoprenon de ĉs.esperantistoj en la rezista kontraŭfaŝista batalo. La turisma komisiono kontaktu tiurilate la esp. terenon en la socialismaj landoj kaj plialtiĝu la eduka kaj kleriga niveloj en la SET Lančov.

Koncerne la junularan aktivecon la iniciato de J.Hoffmann pri Interkluboj per E-o jam donas la unuajn pozitivajn rezultojn. Malkontentiga estas la stato en la Pedagogia sekcio. Ĝis nun ne estas preparitaj korespondaj kursoj kaj al la Lingva komisiono mankas kompetentaj kunlaborantoj.

Laŭ aprobita propono estis nomitaj novaj honoraj membroj de ĈEA: Josef Vondroušek kaj Eduard Felix okaze de siaj vivjubileoj (70 j. kaj 75 j. resp.).

Sekretario de ĈEA Z.Křimský akcentis en sia raporto, ke necesas aktive partopreni en la socia vivo, kio sole povas krei agadspacon ankaŭ por Esperanto. Li informis, ke ĈEA preparas por 1975 seminarion por funkciuloj, kaj, ke ĝi organizos la konsultan renkontiĝon de la esp. asocioj de la socialismaj landoj en la dua jarkvarono. La asocian kongreson prokrastigas ankoraŭ kelkaj kompletigaj dokumentoj aprobotaj de la superaj instancoj.


El 73 ER jam 63 (93%) fariĝis lokaj grupoj de ĈEA. La eldonaktiveco estas relative varia, temas precipe pri kelkaj publikaĵoj omaĝe al la jubilea jaro 1975. Aparte estis eldonitaj bildkartoj,insignoj k.a.

Agadplano por tiu ĉi jaro antaŭvidas ĉefe la tutŝtatajn aranĝojn, la lokaj aŭ regionaj ne estos traktataj enkadre de la plano, se ili jam ne eniris ĝin. Daŭras traktado pri la partopreno de niaj membroj al la 60a UK en Kopenhago. Proponitaj oficialaj delegitoj de ĈEA estas : J.Vítek, D.Kočvara, Z.Křimský, por la junulara kongreso ing.J.Hoffmann.

La plenkunsido aprobis la proponon eldonadi Starto-n ekde 1975 sur la formato A 5. /k/

# Zamenhofa pacvespero

okazis la 16an de dec.en la Esperantista Klubo en Praha, omaĝe al la 115a naskiĝdatreveno de L. L.Zamenhof kaj fine de la pacjubilea jaro.Ĉeestis ĉ.80personoj. Inter la gastoj estis vicprez.de Regiona Packonsilantaro J.Wolt , plue prezidanto de ĈEA J.Vítek k ĝia sekretario Z.Křimský.



La kunvenintojn bonvenigis vicprez. de EKP J.Mařík,la enkondukan poemon de K.Kalocsay "La semo kreskas jam" deklamis dro M.Nývlt,la EKP- vicprezidanto.Sekvis la prelego de O.Kníchal pri L.L.Zamenhof kiel pioniro de la paca kunlaboro kaj interkompreniĝo.Al la arta parto de la vespero kontribuis dro P. Sádlo-Páv kun sia lernanto,ludante je violonĉelo kaj M.Juřenová kun siaj geinfanoj,kies deklamaĵoj renkontis viglan aplaŭdon.Fine M. Nývlt tralegis mesaĝan leteron al la estraro de Ĉeĥa Packonsilantaro kaj la rezolucion pri Ĉilio, kiuj estis unuanime aprobitaj.

La vesperon organizis LG ĈEA kaj la MEM-sekcio de ĈEA. /k/

Omaĝon al Zamenhof okazigis la 10an de dec. LG en Mělník. La solenaĵon akompanis transdono de la diplomoj al frekventintoj de la pasintjara 12monata Esp.kurso.

## PLZEŇ DENOVE

Okaze de la 30a datreveno de la liberigo de Ĉeĥoslovakio kaj okaze de sia 70a datreveno LG en Plzeň aranĝos sub la aŭspicio de la Sindikata Klubo ŠKODA kaj kunlabore kun la ĉeĥa MEM-sekcio

RENKONTIĜON DE ESPERANTISTOJ
/23.-26.5.1975/

El la programo :konferenco de la MEM-sekcio, vizito al okcidentbohemiaj banlokoj, ekskurso al la loka bierfabriko, kultura vespero ktp. Aliĝilojn postulu ĉe Sindikata Klubo ŠKODA, Esperanto-Rondeto, Kopeckého sady 13,301 13 Plzeň - ĝis la 28-a de februaro 1975 !

GRAVA ALVOKO !

La estraro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio alvokas ĉiujn esperantistojn, en- kaj eksterlandajn, partoprenantojn de la rezistomovado en Ĉeĥoslovakio inter 1938-1945, raporti pri siaj tiurilataj aktivecoj en la formo de rememoroj,artikoloj ks.Oni notu sian nomon,adreson kaj profesion,ev.la funkcion en la esp.movado. La manuskriptojn en tri kopioj oni bv.direkti al ĈEA,Jilská 10, 110 00, Praha 1, ČSSR.

## Memorigaj vortoj

En la dokumentoj de la pasintjara Packongreso en Moskvo troviĝas multe da instigaj vortoj, de kiuj povus abunde profiti la adeptoj de la Interlingvo. Al multaj dubemuloj povas komuniki la utilon de nia strebado poresperanta, porpaca ekz. la rezolucio de la kultura komisiono, kiu konstatas i.a. ke "necesas apliki la novajn formojn de la internaciaj kulturaj kontaktoj, disvastigi spiritajn valorojn de ĉiuj nacioj..".La alia citaĵo estas el la raporto de la komisiono pri kunlaboro de neregistaraj internaciaj organizaĵoj :"Grandan signifon en la porpaca batalo akiras nun diversaj amasorganizoj, kiuj sin okupas pri disvastigo de la internacia kunlaboro kaj reciproka interkompreniĝo..." Ĉu endas komentario ? /k/

FESTVIZITO ĈE JUBILEANTO estas la verko de V.Echtner skribita per brajla skribo kaj dediĉita al nevidantaj esperantistoj. Kvazaŭ dum vizito ĉe Wolker oni renkontas en ĝi Jirásek, Vrchlický, Neruda,Zeyer, Baar, kiuj estas reprezentataj per specimeno el sia verkaro.

# Al monato de amikeco

La esperantistoj en Bor, distr. Tachov partoprenis per du tabuloj ekspozicion okaze de la ĉs.-soveta Monato de l'amikeco. Inventamaniere ili konatigis sian peresperantan agadon, kio sukcese reeĥis inter la vizitintoj. Omaĝe al la Granda Oktobro la LG instalis murgazeton en la urbocentro.

La 25an de oktobro oni aranĝis en Bor VESPERON DE LA ĈEĤA MUZIKO, en kiu rolis J.Picek, pianludisto el Hradec Králové, kaj J. Marek, solisto de la Operdomo de F.X.Šalda en Liberec. La saman tagon tiuj ĉi artistoj okazigis edukan koncerton por la urbaj gelernantoj. /ms/

Ekde oktobro LG Mělník kunvenas ĉiun duan mardon. La kunvenojn vizitas ĉefe la junularo. Tiun de la 12.11. partoprenis 26 membroj, kiuj aŭskultis tre interesan rakontadon de la gefratoj Lochman pri ilia vizito al Soveta Azio. Du filmoj pri Buchara kaj Samarkand konvene kompletigis la Vesperon de ĉeĥoslovaka-soveta amikeco.

Okaze de la Zamenhofa vespero en decembro 17 kursanoj ricevis siajn diplomojn pri la fundamenta scio de E-o. La 7an de jan. gimnaziano T.Slavík rakontos pri "Miaj 15 monatoj en Kubo" kun propraj diapozitivoj". Komenchoroj ĉiam je la 16,30 en la lernejo, str.Jungmannovy sady.

OKAZE DE GRANDA OKTOBRO. Elkorajn salutojn kaj bondezirojn okaze de la oktobra revolucia datreveno sendis al Starto kaj ties legantoj Komisiono pri internaciaj ligoj de latviaj esperantistoj kaj Riga Esperanto Klubo kaj N.Andrianova, prezidantino de Komisiono pri internaciaj ligoj en Kievo, Ukraina SSR.

## NOVA ĜEN.SEKR. DE M E M

Laŭ sciigo el Sofio Internacia Komitato de Mondpaca Esperantista Movado /IK MEM/ elektis per plejmulto de la voĉoj kiel ĝeneralan sekretarion de MEM Drahomír K o č v a r a, vicprezidanton de ĈEA. Li anstataŭos la eksan ĝen. sekretarion de MEM, Tomáš B a l d a, kiu forpasis la 8an de dec.1973.

## EL M E M-SEKCIO

Pliaktivigi la porpacan agadon de LG kunlabore kun la lokaj pacorganizoj - kaj aparte inter la junularo - per diversaj manieroj, estis la ĉeftemo de la lasta kunveno de la sekcia MEM-komitato en Praha la 11an de novembro.

Oni aprobis ampleksan raporton al la MEM-prezidanto N. Aleksiev pri la lasta agadperiodo. La komitato ekserĉas novajn metodojn por efektivigo de la bazaj punktoj de sia laborplano, inter kiuj daŭras la tasko popularigi la rezultojn de la Packongreso 1973, varbado por PACO kaj intensa informado en kaj ekster la MEM-rondoj. La eldonaktiveco koncentriĝas nun je eldono de la proksima ĉs.Paco, de la skizo pri MEM k.a.

Inter la komitatanojn de la sekcio estis alelektitaj D.Kočvara, ĝen.sekr. de MEM kaj J.Vítek j, gvidanto de la junulara komisiono de ĈEA.

Estis konstatite, ke ankaŭ la oktobra n-ro de Mír /paco/, organo de Ĉs.Packomitato, aperigis apartan rubrikon de la sekcio./k/

## 20 JAROJ POST MONTEVIDEO

La rezolucio pri Esperanto, akceptita de la 8-a Ĝenerala Konferenco de UNESCO, la 10an de decembro 1954 en Montevideo, fariĝis jam fama dokumento ofte citata ĉe diversaj okazoj. Precipe la vortoj, laŭ kiuj Esperanto kaj ĝia movado servis "por la proksimigo de la popoloj" indas rememorigon.

La internacia situacio post 1954 konsiderinde ŝanĝiĝis favore al plenumado de tiuj ĉi vortoj, al realigo de la Montevidea proklamo. Ili devus esti ne nur solena slogano de la jubileaj artikoloj,

sea ciutaga praktiko de la Esperanto-organizaĵoj.
Aliflanke montriĝas,ke la UNESCO -komisionoj malmulte atentos la rezolucion de 1954, se la esperantistoj mem ne intervenos...Precipe sur la kampo de la naciaj kaj internaciaj organizaĵoj disvolviĝas la batalo pri kaj por Esperanto. Oni rimarkigu, ke ĝuste antaŭ pli ol 20 jaroj eniris sur la movadan scenejon kaj ĉiam pli vaste ankaŭ sur la ekstermovadan - la Mondpaca Esperantista Movado,largigante la socian bazon de la paclagado helpe de Esperanto. La aktiveco de MEM, membro de Tutmonda Packonsilantaro ekde 1971, unike eksplikas eblecojn de landaj kaj tutmondaj Esperanto - asocioj.
Do, la porsocia kaj faka laboroj unualoke. Popularigado kaj instruado de Esperanto apenaŭ efikas,se ili estas memcelaj. Ankaŭ la rezolucio atingita en Montevideo donas klaran pruvon pri tio.

O.Kníchal

# Místní skupiny

*na rok 1975*

## OSTRAVA - VÍTKOVICE

Na počest 30.výročí osvobození ČSSR Sovětskou armádou uspořádá MS v červnu výstavku s názvem "Esperanto ve službách míru". Na vernisáž bude pozván některý sovětský esperantista, který se účastnil osvobozování Československa v roce 1945.
Zkvalitnění ideologické práce hodlá MS dosáhnout tím,že do klubovních programů bude zařazovat besedy ke všem významným politickým výročím. Členové výboru se zúčastní semináře,který uspořádá ÚV ČES, a získané zkušenosti budou přenášet na ostatní členy skupiny.
MS uzavře družbu s drážďanskými esperantisty a spojí jejich plánovanou návštěvu v červnu s vernisáží esp. výstavky.
Odborný růst bude zajištěn tím, že nejúspěšnější absolventi kurzů se podrobí zkouškám znalosti a schopnosti vyučovat esperantu.Budeme vyžadovat, aby všichni členové zvyšovali svou jazykovou kvalifikaci. Tomuto účelu věnujeme na našich schůzkách 90 minut. Nové členy budeme získávat z odborného učiliště VŽKG a z dělnických domovů, kde uspořádáme propagační přednášky.
I nadále budeme propagovat mezi svými členy letní esperantské školy u nás i v socialistických zemích. Nadále zůstáváme patrony esp. kroužku při Krajském domě pionýrů a mládeže v Mariánských horách, odkud k nám přicházejí noví členové. Také v roce 1975 vybereme účastníky pro zahraniční pracovní brigády.

D.Kočvara, předseda

## KARLOVY VARY

Z podrobného programu na 1.čtvrtletí 1975 vyjímáme několik akcí, jež se týkají vzdělávací,vyučovací a organizační stránky činnosti MS : 51.výročí úmrtí V.I.Lenina, Film o SET Lančov/leden/,Setkání s esperantskou mládeží NDR, Slavnostní schůze u příležitosti Únorového výročí /únor/, Mezinárodní den žen,J.A.Komenský /březen/. Programy zajistí či povedou A.Taitlová /předsedkyně MS/,J.Klement,jednatel,ss.Milev,Vítek,Krupková,Taušová a Kafka.
Všechny akce se konají v klubovně nebo v sále MS, Engelsova 47, Karlovy Vary-Rybáře, každé úterý od 18,00. Lázeňští hosté a pacienti esperantisté jsou srdečně zváni.

**Inter klub**

DVA DNY V HEJNICÍCH. Čtyřicet pět chlapců a děvčat se sešlo ve dnech 3.-5.1.v Hejnicích u Frýdlantu v Č. na 10.jubilejním semináři,který uspořádala Komise pro činnost mládeže při ČES ve spolupráci s MS v Liberci. Předseda MS Aleš Nedomlel,manželé Kazderovi a V.Vítek/všichni členové komise/ zajistili hladký průběh programu. Za ÚV ČES byli přítomni tajemník Zdenko Křimský,který informoval o organizační struktuře svazu a o úkolech pracovníků mládežnické komise jako budoucích funkcionářů ČES, a O.Kníchal,který seznámil účastníky s mírovou prací čs. esperantistů.

V přednáškovém cyklu vystoupili V.Vítek /o L.L.Zamenhofovi/, J. Vlasák /50 let Interhelpa/, L.Škoda /Historie snah o prolomení jazykové bariéry/, A.Nedomlel /zeměpisné zajímavosti/ a O.Kníchal /Esperanto a jazykový problém v současných mezinárodních stycích/ Exkursi po historických památkách Hejnic vedl M.Kazdera.Volné chvíle zpestřil zábavný program, k němuž přispěli J.Havelka a P.Skála.

Zasedání komise konstatovalo mj.že mladí esperantisté pracují ve 4 Interklubech,avšak trvale je pociťován nedostatek kvalifikovaných pedagogů z řad mladých členů./O tom podrobněji příště/.

Na závěr V.Vítek,zastupující předsedu komise převzal symbolickou štafetu 11.semináře,který se uskuteční začátkem května v Mělníku.

---

Závěr roku bývá příležitostí poohlédnout se za vykonanou prací. Naše komise ještě mnoho bilancovat nemůže,protože vznikla teprve v druhé polovině 1974. Přesto však již po mělnické schůzce se vytvořila síť spolupracovníků ve většině MS.Komise dále organizovala dva semináře, několik kurzů pro mladé a pomohla založit několik Interklubů SSM.Je to ovšem jen zlomek práce,která nás ještě čeká v roce 1975.

PO STOPÁCH INTERHELPA

Turistická komise ČES ve spolupráci s CKM pořádají zájezd "Po stopách Interhelpa" k 50. výročí odjezdu družstva z vlasti."Interhelpo"bylo jednou z nejvýznamnějších akcí světového proletariátu na pomoc Sovětskému Rusku.Vzniklo z popudu stoupenců mezinárodního jazyka.

Trasa zájezdu: Praha-Žilina-Moskva-Alma-Ata-Frunze-Taškent - Dušanbe-Aščhabád-Moskva/vlakem/ - Praha /letecky/.

Zájezd je rozvržen na 14 až 21 dní. Zájemci se mohou vyjádřit ke trase, případně ji zpestřit. Ve všech městech jsou okružní autobusové jízdy a plánována setkání s místními esp.kroužky. Zájezd se uskuteční v říjnu 1975 a jeho cena bude asi 4 500 Kčs. Přihláška je závazná po zaplacení 1000 Kčs na bankovní konto ČES. Uzávěrka je koncem ledna.

GAZETARA SPEGULO. En Svět práce /n-ro 49/ aperis artikolo de O. Kníchal "Doktoro Esperanto" o En artikolo pri "UNESCO kaj E-o"notas Práce /14.12./ la jubileon de la montevidea rezolucio. o Rezolucion pri Ĉilio de EK Praha disvastigis la presagentejo ČTK/citaĵo en Práce,18.12./ o Pri la krucenigmoj de J.Cink en Starto skribas "Hádanka a křížovka"n-ro 15.

**KORESPONDI**

*deziras*

E.TÓTH 8900 Zalaegerszeg,Gaspan. ut.15 kaj M.KOVÁCS 48j.inoj,6800 Hódmezövásárhely,Bovóka 1 o HAJDÚ K. 5700 Gyula,Part u.1sz o 19 komencantoj ĉe : A.SALGA,Olaz ut.13, ĉiuj Hungario o L.Fern. Martínez Solís,p.k. 6950,Medellín, Kolumbio S.A. o 13-14j.lernantoj ĉe: Irena Maixnerová,Kollárova 240, 563 01, Lanškroun, ČSSR.

# NI LEGIS

Josef C i n k : CVIČEBNICE ESPERANTA PRO POKROČILÉ. Ekzercaro por perfektiĝi en Esperanto. Ŝtata pedagogia eldonejo,Praha 1974./ĉeñe/ Ĝi estas la unua tiaspeca lernolibro por ĉeĥoj,ĉar ĉiuj aliaj ĝis nun eldonitaj estis por komencantoj. La arango de la ekzercoj estas inversa kompare al la aliaj ekzercaroj : unue estas gramatikaj ekzercoj kaj nur poste sekvas artikoloj por legado. Tio estas bonveniĝenda, ĉar necesas diversaj tipoj kaj aranĝoj de lernolibroj.

La lernolibro estas provizita per detale ellaborita registro de gramatikaĵoj, konversaciaj temoj,literaturaĵoj ktp. Sekve oni ne devas paŝi de la unua ekzerco al la dua,tria ktp.,sed laŭplaĉe studi nur gramatikon aŭ nur konversaciadon, laŭ la paĝoj en registro. La libro do povas roli ankaŭ kiel "programita" lernolibro. La detale ellaboritaj ekzercoj bone servos al la honestaj memlernantoj.

Preserarojn oni ne trovas, lingvaj eraroj estas bagatelaj, ekz. anst."la teritorio mezuras" devas esti "la teritorio havas mezuron", ĉar "mezuri" estas transitiva ; anst."klika-anso" devas esti "klinko", ĉar anso estas nemovebla ; anst."tepláky-varmkalsono" devus esti "varmkostumo,varmpantalono"k.s.,ĉar kalsono estas mallonga subvesto. /pa/

LA FORAJ STELOJ. Novelaro el Vjetnamio,Hanojo,1974,254 pĝ.

Estas salutinde, ke la Fremdlingva eldonejo en Hanojo venas kun la nova serio de noveloj. Post la jam konatiĝinta kolekto La horloĝisto de Djen Bjen Fu /1971/ revuanta la periodon inter 1946-64, tiu ĉi prezentas la lastatempajn 12 verketojn de 9 verkistoj/el kiuj la lasta estas subskribita en 1972/. Tiu ĉi plej freŝa periodo, kiam la usonaj agresantoj intensigadis la militon en Nordo, estis la plej malfacila por la vjetnama popolo. Kompreneble ĝi estas la ĉefmotivo, kiu karakterizas ankaŭ la priparolitan novelaron.

Eble estus bone, se la redaktintoj provizus venonte similajn publikaĵojn per koncizaj biografioj de la aŭtoroj.La vjetnamaj amikoj akceptu nian dankon pro tiu ĉi bela donaco al la tutmonda esperantistaro ! /k/

Gim T a e k e n g: UNIVERSITATA LERNOLIBRO DE ESPERANTO. Seoul 1973, Meong Ji.Universitata eldono aprobita de kontrolkomisiono de lernolibroj de UEA. Prezo egalvalora al 3US dol.Eldonkv.100,174pĝ.

En la nomita universitato ekde la dua semestro 1965 E-o estas oficiale instruata dum 13 horoj semajne /far lektoro Taekeng/. Natura bezono de bona lernolibro gvidis la aŭtoron plenumi la didaktikan celon per metodo,kiu, laŭ lia opinio estas la plej taŭga por maturaj studentoj, kiuj en la pensmaniero certagrade diferencas de siaj europaj kolegoj.Kunlabore kun la kontrolintoj /prof.N.Kawasaki,D.B.Gregor k.c./li sukcesis eldoni modernan,tre kvalitan lernolibron,kies valoron pritaksos ankaŭ lingvoinstruistoj de aliaj kontinentoj. Pluraj novaĵoj gvidas la studenton de vortoj al kompletaj tekstoj,kiujn akompanas klarigoj,gramatikaj eroj,demandoj, respondoj kaj lingvaj ekzercoj. Korektendaj frazoj intence erarskribitaj en la ekzercoj, frazfarado kun abunda,ĉiam utila materialo, bone varias kun la cetera teksto. Aparta kvalite verkita ĉapitro pri vortfarado kompletigas konvene la lernolibron, kies lastaj paĝoj enhavas solvojn de ekzercoj.Antaŭ la ekuzo oni ĝustigu ĉiujn korektendaĵojn laŭ la aldonita aparta listo.

Bona, moderna, plene rekomendinda helpilo. J. Vítek

# Letero de JEL

La Administra Komitato de Jugoslavia Esperanto-Ligo konatiĝis kun la artikolo "Sen abscesoj" /Starto n-ro 6/1974/ kaj konsterniĝis leginte la alineon :

"En la dua komitata kunveno I.Lapenna kaj liaj partianoj lanĉis ampleksan atakon kontraŭ estrarano pri financoj, J.Woessink, kiu insistis ke estu klarigitaj malkorektaĵoj en la financoj de la beograda kongreso. Post preskaŭ tuttaga kverelado kaj manipulado la Komitato rifuzis la atakojn kontraŭ Woessink kaj decidis, ke la afero estu pritraktita nur post fundaj esploroj".

Ni deziras nek polemiki nek kvereli kun iu ajn pri tio, sed /ĉar temas pri la beograda kongreso/ ni rajtas postuli konatigi legantojn de STARTO kun la vera okazaĵo en la menciita komitatkunveno. La veron respegulas la oficiala "Protokolo de la kunsidoj en Hamburgo" /de la Komitato de UEA/, kie sur la paĝo 18 staras :

"La Komitato deklaris, ke s-ro Woessink konservas la rajton prezenti kaj proponi ktp., sed la Komitato samtempe deklaris, ke nenio en la nuna stadio implicas, ke estas faritaj kiaj ajn fiagoj, trompoj, ŝteloj aŭ similaj esprimoj uzitaj en cirkuleroj de s-ro Woessink, kaj ke sekve la Komitato en la nuna stadio esprimas plenan konfidon al Prof.Popović". Tiun tekston la Komitato per aplaŭdo aprobas.

La diverseco de la tekstoj mem parolas sufiĉe kaj ni lasas al la legantoj fari la propran konkludon. Ni substrekas, ke ni ne emas respondi al eventualaj provoj ĉirkaŭiri la veron.

Prof.d-ro B.Popović, prezidanto

## SKRIBAS LA LEGANTOJ

PRI UNU MALSANO /Starto 6/74/ Mi ne volas senkulpigi ĉiujn amatorajn aktivulojn en nia movado, sed la samo koncernas la t.n. neamatorojn. Ĉiu ja komencis per amatoreco kaj kontraŭbatalo estas nenatura - pli malutila ol aktivemo de amatoroj... Nia movado ja ankoraŭ ne plene forlasis hobiecan formon, kiu cetere tre grave meritas pri tio, ke E-o ankoraŭ ne pereis. La amatorismo kaj diletantismo estas eble malsanoj, sed ne solaj kaj tute ne la plej grava. /El la letero de J.Prachař, Pacov/

Red.noto : Ĉu L.P. vere opinias, ke la hobieca formo vivtenis la movadon ? Bedaŭrinde, esenco de la amatorismo kaj diletantismo esperantista oni ofte miskomprenas, parolante ĉ e f e pri la lingvo mem, ne pri la apliko. Precipe la ĝusta konceptado de la problemo povus forigi tiun ĉi miskomprenon. /k/

PRI STARTO. Post finlego kaj trifoja relego de la 7a numero mi povas diri nur : Gratulon! Ĝiskreve plenigita de tre interesaj kaj edifaj informoj tiu ĉi numero estu modelo por ĉiuj venontaj...Bonega estis la ideo represi la artikoleton el "Český esperantista", 1912. La konstatoj de la artikolo eĉ hodiaŭ nenion perdis de sia aktualeco, bedaŭrinde!... Nenature estas nur, ke niaj labormetodoj ŝtoniĝis...Kiam ni ĝislarme emociiĝas super "nia kara verda lingvo", ni aspektas en la okuloj de neesperantista publiko kiel histrionoj."
/El la letero de A.Zmeškal, Praha/

# Prago - Praha

La diskuton pri tiu ĉi temo, en kiu la aŭtoroj pledas principe por Prago aŭ por paralela uzo de ambaŭ formoj ni fermas ĉe la fino per artikolo de d-ro J.Kavka, kreinto de la geografia nomaro en la Poŝtatlaso de la mondo en E-o, kun kiu la redakcio havas konforman starpunkton. Kiel videble la respondo ne povas esti centprocente jesa aŭ nea. Venonte sekvos la l a s t a altema kontribuaĵo de J. Kořínek.

NUR PRAGO. Oni permesu al mi nepre pledi por la formo PRAGO. Polo ne hezitas nomi en Esperanto la ĉefurbon de sia lando VARSOVIO, same al franco plaĉas la nomo PARIZO ktp.; kial sole ni ĉeĥoj obstinu pri la formo nacilingva? Tio ĉi fakte ridindigus nin en la tuta mondo,ĉar ni plenrajte meritus la riproĉon, ke ni miope bagateligas la graveĉon de nia kara metropolo, degradante ĝin al la nivelo de ia Kardaš. Řečice.

Al la ĵus dirita konvinko mi cetere venis jam en la jaro 1935: tradukante por Ĉeĥoslovaka Antologio la satiran poemon el la 14a jarcento "Podkonie a žák"/=Stalisto kaj studento/, mi aplikis la jenan rimon:

Flanojn por altpreza pago
manĝos li kun mi en PRAGO.

Mi kuraĝas demandi, kiamaniere la koncernan versduon konsilus traduki nia ŝatata amiko Sviták. M.Lukáš

PRAGO KAJ PRAHA. En ĉiuj naciaj lingvoj ekzistas naciigitaj formoj de la plej konataj geografiaj nomoj, kutime akomoditaj al la karaktero de la koncerna nacia lingvo. Ilia deveno certe estas ĉiam malnova, ekzp. ĉeĥe: Paříž, Vídĕň, Řím k.a. Aliaj nomoj havas almenaŭ ĉeĥigitan ortografion: Varšava, Budapešť, Berlín. Ankaŭ Praha havas aliajn formojn en la aliaj lingvoj: Praga, Prag, Prague...

Esperanto rajtas nature krei la proprajn Esp. formojn,ekz.Prago,Parizo ktp. Multaj tiaj nomoj jam tute enhejmiĝis en E-o, ĉar ili konformas al ĝia karaktero. Tial simile al la Akademia decido pri -ujo, -io ni lasu al aferon al plua libera evoluo kaj ni ne subpremu tiun aŭ alian formon. Kontraŭe, speciale alilingvaj esperantistoj devus preferi la formon Prago. A.Staňura

PREFERE PRAGO. La formo "Praha" havas multajn malavantaĝojn. Unue-ĝi estas malbone prononcata, ekz. en la esperantlingvaj dissendoj anst.la ĝusta mallonga prononco /Praha/ oni diras - konforme al la reguloj de la Esperanta prononcado - kutime "Práha", "Práĥa", kaj tiuj, kiuj ne scias elparoli "h", diras eĉ "Práa". Due - oni malfacile povas formi derivaĵojn, tiaj vortoj kiel "Prahon","prahaj","Prahanoj" aŭ eĉ "Prahaon","prahaaj","Prahaanoj" estas sufiĉe monstraj. Trie - en plejmulto de lingvoj ekzistas latinradika nomo por nia ĉefurbo,ekz."Prag"ili "Praga", al kiu konformas la formo "Prago". Cetere tiun ĉi formon ni trovas ankaŭ en multaj nacilingvaj firmaaj nomoj kiel "Pragoexport,Pragoinvest,Pragokoncert, ja eĉ Pragodĕv, Pragomóda k.a.

La formo "Prago" komplete konformas al la reguloj kaj kutimoj de la Esperanta prononcado, oni povas facile formi el ĝi derivaĵojn /Pragon, pragaj, praganoj,enpragiĝi,elpragiĝi,enpragigi leteron - ĉu tion oni ne povus diri?/

La nacilingvan formon "Praha" oni povas bone uzi en adresoj aŭ en fakaj verkoj, dum la asimilitan formon "Prago" oni uzu en informaj artikoloj kaj beletro. Cetere simile estas ankaŭ ĉe aliaj ĉefurboj, kiel ekz. Wien - Vieno, Paris - Parizo, Roma - Romo, Budapest - Budapeŝto, ktp. J.Patera

KIAL PRAHA ? Nia estimata amiko inĝ.F.Sviták tuŝis la demandon interesan ne sole por la ĉeĥaj, sed vere por ĉiulandaj esperantistoj. Li konsilas - laŭ la modelo de UNO,UNESCO,UEA,CED k.a. - uzadi la originalan formon de nia ĉefurba nomo /Praha/kaj eviti la formon asimilitan/Prago/. Li citas Zamenhof :"Komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon ol seka teoria logikeco".

Nu,koncerne la komunan uzadon la kelkjaraj esploroj,faritaj de dro Pumpr kaj de mi, evidentigis en Esperanto nekontesteblan tendencon al asimilitaj loknomaj formoj. Cetere,la vojo estas montrita de Zamenhof mem. Kreinte la fleksian strukturon de Internacia lingvo,li konkrete aplikadis la nomojn Prago, Parizo, Londono,Vaŝingtono kaj multajn aliajn. Li bone konsciis, ke la nacilingvaj formoj fariĝus por la buŝo,orelo kaj okulo de esperantisto nur fontoj de embaraso. Krome, la nelatinskribaj lingvoj apenaŭ kuraĝus oferti al Esperanto siajn originalajn nomformojn...

Sed ni revenu al Prago por iom referenci : Ĝi estas registrita en la gravaj vortaroj,ekz. en G.WARINGHIEN /1957/, R.LEGER - A.ALBAULT /1961/, E.BOKAREV /1966,1974/,PLENA ILUSTRITA VORTARO/1970/, rekomendita en PLENA GRAMATIKO /1938/ kaj aplikita en konsiderindaj geografiaĵoj,ekz.G.SAVILLE /1936/, POŜATLASO DE LA MONDO/1971/ kaj F.MUNNIKSMA /1973/.

Nun ĉiu esperantisto mem pripensu, ĉu li preferos la nacian formon aŭ la formon asimilitan. Ambaŭ ja estas egale rekoneblaj de internacia publiko, sed nur la dua ebligas fleksadon konforme al la gramatikaj reguloj de Esperanto. Kial imiti alistrukturajn lingvojn, ekz.la anglan kun ties tedaj "of the..of the...of the", helpe de la prepozicioj evitante akuzativon, adverbon,derivaĵojn ? Tia peza esprimmaniero neniel harmonius kun la modelaj stiloj de Zamenhof,Kalocsay,Auld k.a. Ankoraŭ malpli bele aspektas la formoj: Praha'n, Praha'a, Praha'anoj, kiuj kreas precedenton por ĉiu ĉeĥismo de la tipo : Přemysl'n, efikanta perforte eĉ monstre kaj apenaŭ prononcebla de la neĉeĥoj.

Memkomprene,la formo Praha ankoraŭ longtempe ĉefrolos en adres-indikoj. Neevitebla ĝi estas tiam, kiam temas pri citado de dokumentoj, referencado de fontoj k.t.p. Sed tiaj okazoj eskapas jam el koncepto pri pura esperantlingva teksto. J. Kavka

FINE PRI P R A H A. La defendantoj de "Prago" tute neglektas sintenon de ĉs.ŝtataj institucioj, kiuj ne aliĝas al la fremdaj modeloj kaj uzas en la interŝtataj jontraktoj fiere la nomon Praha. La kritikantoj ankaŭ ne venis kun ia ajn solvo,kiel mi instigis ilin, manipulante plejparte per la kezemploj el poezio.

Inĝ. Felix kontraŭas mian koncepton kun la aserto, ke la grandparto de alilingvanoj ne kapablas la nomon Praha eĉ prononci, dum la longjaraj spertoj el p r a h a klubo pruvas la malon. Li kaj la ceteraj asertas, ke ekz.la francoj aŭ rusoj ne kapablas prononci la konsonanton "h" - do ĉu ili sekve proponus eliĝi ĝin el la Esp. alfabeto ? F.Sviták

---

DOBROVOLNÉ DARY. F.Pytloun, Poděbrady - 50Kčs, MUDr. L. Holzová, Vsetín - 20, B.Metznerová, Dubí u Teplic - 20, S.Konrád, Benetice, 20, J.David,Pustějov - 28, V.Kasal,Plzeň - 22, V.Kohout,Praha -10, B.Sochor,K.Studánka-22, M.Otto-5, G.Lévay-10,KELI-50.Srdečný dík !

NI SINCERE DANKAS AL ĈIUJ GRATULINTOJ POR LA NOVA JARO !!!

# Rondeta vivo

B R N O – La 26an de nov.okazis koncerto okaze de la neĝisvivita sepdekjariĝo de prof.V.Scheiber. Kantis H.Supová-Halířová,kiu la koncerton preparis,plue V.Dronská, V.Halíř,R.Chudoba. Violonis A.Jíra,pianakompanon prizorgis profesoroj J.Doležel kaj P. Kuchař.Partoprenis ĉ.130 personoj.
La 1an de okt.komenciĝis 10monata kurso de E-o.Instruas s-ro J.Vondroušek.

L A N Š K R O U N – Kunlabore kun la "modela urba biblioteko" la ER arangas de tempo al tempo interesajn prelegojn pri vojaĝado kun lumbildoj. La publiko ĉe tiaj okazoj ĉiam konvinkiĝas pri la utilo kaj taŭgeco de la IL. La 28an de nov.prelegis J. Pištora pri sia vojaĝo al Hispanio. /zp/

R O U D N I C E n.L. – La 22an de nov. okazis la unua kunsido de la rondetanoj kun la anoj de Interklubo /gvidis J.Vítek j.kaj F.Tymich, estro de la urba filio de SČSP/. La sukcesa aranĝo okaze de la amikeca monato kun USSR finiĝis per filmprezento pri la soveta Azio.

Č.T Ř E B O V Á – ER Amikeco invitas onin ĉeesti la 6an Esperantan balon /15.2./en la Uzina Fervojista Klubo.Informoj: J.Pištora,Nám.míru1746,Č.Třebová.

P O D Ě B R A D Y – Konstituiĝis LG ĈEA /5.12.74/.Kiel la prezidanto estis elektita F.Bytloun, honora membro de ĈEA,kiel sekretario F.Polnický/kor.adreso: Engelsova 287/II,Poděbrady/. LG havas 33 pagantajn membrojn.

J A B L O N E C n.N. – Preskaŭ cent personoj,inter ili ankaŭ gastoj el GDR kaj Pollando partoprenis Nikolaan vesperon la 7an de dec.
Estiĝis novaj personaj kontaktoj de gejunuloj por plua kunlaboro de la Esp.-kluboj ĉe la limo de paco, Odra-Nisa. /max/

O S T R A V A /VŽKG/ – La Esperanta balo anoncita en la lasta n-ro okazos la 31an de januaro!

En novembro prelegis M.Neuwirth pri la Tretjakovskij-galerio en Leningrado,pri siaj travivaĵoj en Hungario raportis M.Bartovská kaj L.Slunečková kaj sian libertempon en GDR prirakontis LG -anoj Hlinčík kaj Šnajder.

P Ř Í B O R – La 11.10. en la urba Jubilea Parko oni starigis ŝtonon kun la jarkalkulo 1897, kiam en Příbor fondiĝis filio de Socialdemokrata partio kaj samtempe la unua esperantista l a b o r i s t a rondeto sub la gvido de J.Káně. Dank'al la iniciato de la grupestro A. Sattek la Kulturdomo den Příbor eldonis lastatempe vidaĵkarton pri la urbo kun ĉeĥa kaj E-a tekstoj.

## K R O N I K O

R.HORSKÝ 60j. Prof.d-ro Rudolf H o r s k ý, prodekano de la Hus-Fakultato en Praha,sekciestro de KELI, komitatano de MEM-sekcio de ĈEA ĝisvivis la 4an de dec.sian 60an jaron. Inter 1967 kaj 1972 li prezidis la ĉefurban EK, efike kontribuante al la popularigo de E-o. Pri sia vojaĝo al Hispanio okaze de la 53a UK li aŭtoris samnoman verketon.Al la aktiva jubileanto koran gratulon ! /k/

MUDr.Josef H r a d i l el Český Dub kvindekjariĝis la 22-an de nov. Li konatiĝis inter ĉs. esperantistoj medicinistoj kiel fondinto kaj redaktanto de la Medicinistaj Informoj ekspedataj ankaŭ eksterlanden.

Ota S k l e n č k a, aktoro, membro de EK Praha festis sian 55an naskiĝdatrevenon la 19an de decembro.

La 23an de novembro solenis la oran edziĝfeston Anna kaj Antonín S a t t e k el Příbor.

Marie H a s t e r m a n o v á el Praha 85jariĝis la 29an de novembro.

Al ĉiuj koran gratulon !

## MESAĜO EL DANLANDO

El Danlando venis al ĈEA letero de s-ro Erling Windeballe, en kiu li skribas :

Veninte hejmen post 19taga restado en Ĉeĥoslovakio mi deziras danki al ĉiuj, kiuj gastame kaj amike akceptis min en hejmoj kaj kluboj. Mi prelegis kaj montris lumbildojn pri la dana fabelverkisto H.C.Andersen en la kluboj en Ostrava-Poruba, Opava, Vítkovice, Příbor, Frýdek Místek kaj Brno. Ĉie mi sentis min kiel inter amikoj kaj ĉie oni klopodis agrabligi mian restadon kaj fari ĝin riĉa je travivaĵoj. Speciale mi dankas al s-ino L.Klegová, kiu modele arangis mian prelegvojaĝon kaj zorgis, ke mi vizitu interesajn kaj belajn lokojn en via lando.
Koran dankon kaj saluton al ĉiuj.

Laŭ la informo de A.Staňura el Ostrava la prelegoj de E. Windeballe estis tradukataj ĉeĥlingven, ĉar ili vekis ankaŭ atenton de la neesperantista publiko. En Poruba oni reklamis per du grandaj afiŝoj surstrate.

---

AL ĈIUJ MEMBROJ DE LA FRATA ASOCIO DEZIRAS KVIETAN TRAVIVON DE LA KRISTNASKAJ FESTOJ KAJ SUKCESPLENAN 1975-an JARON MEMBROJ DE LA ESPERANTO-RONDETO ĈE MUZEO DE JANKO KRÁĽ EN LIPTOVSKÝ MIKULÁŠ, SLOVAKIO.

KOREKTA NOMO de la tradukinto de Nuda inter lupoj /recenzo en la 7a numero/ estas K. Schulze. Ni pardonpetas.

LA KULTURO SERĈATA. Studcele mi serĉas laboristan gazeton "La Kulturo" aperantan en Praha inter 1912-1914. Vl.Kočvara, Na dolním poli 10, 746 01 Opava, ČSSR. Bonorda redono garantiita.

PETO AL LA LEGANTOJ-KONTRIBUONTOJ. Ekde la venonta jaro bv.ekspedi viajn kontribuaĵojn por la STARTO, precipe la pli ampleksajn, en t r i kopioj. Estas dezirinde verki ilin en Esperanto ! Dankon !

## *Dancu, dancu, ne staru*

/TANCUJ, TANCUJ, VYKRÚCAJ/
Slovaka popolkanto

Dancu, dancu, ne staru,
sed ke forno ne falu,
vintre forno tre gravas,
liton ĉiu ne havas.

Staras gard' en hor' frua,
la soldat' en jak' trua,
de vesper' ĝis tag' ruĝas,
malgraŭ ke lin ros' duŝas.

Ciganino vi eta,
kun donac' mi vin petas,
havas via sorĉ' ilon
sorĉi al mi tuj viron.

Ke cigano ŝin batas
ciganino ne ŝatas,
per forkego en-mane
ŝi regalas lin same.

Tradukis Jiří Kořínek

"PAŜOJ" DENOVE AĈETEBLAJ POR 19 Kčs

# INDEKSO 1974

STARTO - eldonas ĈEA, Jilská 10,110 00 Praha 1. Resp.redaktoro O.Knichal,red.rondo: E.Felix,J. Mařík,F.Sviták.-Dohl.pošta Praha 07,sníž.pošt. popl.pov.ŘP Pha j.z. P/1-2283/1971.


| ORGANIZA VIVO | n-ro | pĝ. |
|---|---|---|
| Ĉu "nur" politiko ? /kni/ | 3/4 | 1 |
| N e z b y t n o s t /Z.Křimský/ | 3/4 | 2 |
| Valora kunlaboro /k/ | 5 | 1 |
| En la jubileanta Opava /kni-vk/ | 5 | 2 |
| Kongreso de AE SSR /lk-ok/ | 5 | 3 |
| Skize pri la 59a UK /kni/ | 6 | 1 |
| Sen abscesoj /F.Sviták/ | 6 | 3 |
| Post unujara paŭzo /Mělník/ kni | 7 | 1 |
| Plzeň ekspoziciis /k/ | 7 | 2 |
| Místní skupiny na rok 1975 /J.Vítek-D.Kočvara/ | 7,8 | 3,6 |
| Naše úkoly a odpovědnost /er/ | 1 | 6 |
| Do nového roku /J.Vítek, Z.Křimský/ | 8 | 2 |
| Proksimaj taskoj /kni/ | 8 | 3 |
| Dudek jaroj post Montevideo /O.Knichal/ | 8 | 5 |

| FAKOJ, ESPERANTOLOGIO | | |
|---|---|---|
| Honorigo al pacaktivuloj /k/ | 1 | 1 |
| Komuna Deklaro | 1 | 3 |
| Al la pacmovada jaro /kni/ | 2 | 2 |
| Ĉu granda problemo ? /L.Špína/ | 1 | 5 |
| Neologismoj kaj amatorismo /J.Werner/ | 1 | 7 |
| Filatelistoj internacie /espo/ | 2 | 4 |
| TS ĈEA atentigas | 2 | 6 |
| Pri kio prelegos geologoj Esperante ? /J.Kavka/ | 3/4 | 4 |
| Internacia lingvo kaj geologio /J.Kavka/ | 5 | 4 |
| Mladí esperantisté jdou do toho /J.Vítek j./ | 5 | 6 |
| Fervojistoj en Tarragona /J.Pištora/ | 5 | 10 |
| Valoraj atingoj ankaŭ per p.m. /espo/ | 7 | 5 |
| Pri unu malsano /O.Knichal/ | 6 | 5 |
| Sukcesa jarkonferenco de FS /JaPa/ | 7 | 9 |
| I n t e r k l u b | 7,8 | 8,7 |
| Ĉu Praha aŭ Prago ? /Sviták,Felix,Staňura,Patera, Lukáš, Kavka/ | 6,7,8 | |

NI LEGIS...

Baroja /Felix/ 2/5 ; Marin /kni/ 3/4-10 ; Nesvadba/Kořínek/ 7/6 ; Apitz /kni/ 7/6 ; Cink /pa/ 8/8 ; Taekeng /Vítek/ 8/8 ; La foraj steloj /k/ 8/8

RONDETA VIVO

Bor, Brno, Budějovice, Aš, Havířov, Hořice,Hradec Králové,Havlíčkův Brod, Česká Třebová, Jablonec, Kyjov, Liberec, Mělník, Opava, Osstrava, Ostrov, Písek, Plzeň, Pardubice, Poděbrady, Polička,Praha, Přerov, Příbor, Roudnice n.L., Znojmo, Šumperk, Lanškroun, Třebíč

KRONIKO

Balda 1/2 , Kilián 6/6 , Vondroušek 7/4 , Felix 7/4, Horský 8/12

BELETRO, RIPORTAĴOJ

Ora leono /J.Pavelka/ 2/7, Kun latva veterano /J.Gold/, 3/4-5, El kosmaj kantoj /Neruda-Černý/ 5/9, Pasio dumviva /Gold/ 7/7, Kristnaska /Branislav-Kořínek/

# INFORMACE ze SEKRETARIÁTU ČES

VÝSLEDKY SLOSOVÁNÍ S K P. Dne 14. prosince 1974 se konalo v sekretariátu ČES slosování SKP Českého esperantského svazu. Uvádíme pořadí cen /v závorce číslo losu/ :
1/2831/,2/0211/,3/2666/,4/3583/, 5/0529/,6/1541/,7/3767/,8/2562/, 9/3000/, 10/3896/,11/1254/,12/0016/, 13/1705/,14/3735/, 15/0202/,16/2671/ 17/3775/,18/2348/,19/0727/,20/0326/, 21/0810/,22/0771/,23/1142/,24/0907/, 25/3270/,26/1961/,27/2874/,28/2341/, 29/1285/,30/0534/,31/3725/,32/0687/,33/3076/,34/1152/,35/3274/,36/0512/,37/2704/,38/0948/,39/1180/,40/0274/,41/0019/,42/1611/, 43/0984/, 44/2828/, 45/0852/, 46/3807/, 47/3250/,48/1589/, 49/0204/, 50/3814/, 51/2851/, 52/1007/, 53/1622/, 54/2284/, 55/1318/, 56/3261/, 57/3770/, 58/1714/, 59/2046/, 60/0396/,61/2500/,62/1547/, 63/3545/, 64/2267/, 65/0304/, 66/2036/,67/0855/,68/1451/,69/1351/, 70/1831/,71/1044/,72/1562/, 73/2926/,74/2431/,75/2497/,76/1240/, 77/3429/, 78/1085/, 79/3856/, 80/1305/, 81/1266/, 82/3298/, 83/3459/ 84/2783/,85/1033/, 86/1070/,87/0927/,88/0503/,89/2429/, 90/1981/, 91/3001/,92/2219/,93/2332/,94/3964/,95/2526/,96/2723/,97/2396/,98 99/0502/,100/2075/,101/0877/,102/2274/,103/1582/,104/1178/, 105/1242/,106/0076/,107/2533/,108/0724,109/1540/,110/0843/,111/1365/, 112/1859/,113/1936/,114/0723/,115/1524/,116/1804/,117/0040/, 118/1338/,119/1663/,120/3626/,121/3846/,122/3996/,123/0206/,124/0764/, 125/2887/,126/0835/,127/0391/,128/0495/,129/1577/,130/1670/, 131/2555/,132/3165/,133/2321/,134/1311/,135/0340/,136/1009/,137 /0928/ 138/2458/,139/2668/,140/0318/,141/0358/,142/1723/,143/3802/, 144/2323/,145/3397/,146/2480/,147/3488/,148/1787/,149/0455/150/2883/.

Na SKP byly uvedeny některé mylné informace : 1/Jde o svazový odznak ČES a ZE SSR v ceně 7 Kčs, 2/Propagační samolepky,dva druhy po Kčs 5 a 6.

PUBLIKACE "Pri la varmo" nebude zřejmě vytištěna do konce roku. Máte-li o ni zájem, pošlete svoji SKP a na ní uveďte jméno a adresu s poznámkou "Pri la varmo". Cena bude asi 21Kčs. Kromě nabídky uvedené na 2.straně SKP si můžete vyměnit i ostatní naše materiály. Informujte se u vedoucích MS !

VYDALI jsme portrét L.L.Zamenhofa podle předlohy D.Bartošíka,jako příspěvek ke 115. výročí narození autora esperanta. Zájemci si o něj mohou napsat do sekretariátu.Cena 1,50 Kčs. Letos jsme rovněž vydali 20 druhů vánočních a novoročních pohlednic s esp.textem, dosud nejširší sortiment tohoto druhu.

PODAŘILO SE NÁM zajistit tisk literárního almanachu PANORAMO a MEDICINAJ INFORMOJ. Budou tištěny ofsetem, formát A5. Panoramo bude vycházet 2x ročně o rozsahu asi 40 stran, M.I. 4x ročně o rozsahu asi 16 stran. Náklad Panorama 1000 ks, náklad M.I. asi poloviční. Předplatné za Panoramo asi 20-25 Kčs, za M.I. 25 Kčs. Obě publikace nabízíme přednostně našim členům. První PANORAMO /dvojčíslo 1974/ vyjde jako náborový tisk v únoru 1975,ročník 1975 během roku. Náborové číslo Panoramo vložíme do Starta a Informací - se složenkou. Pokud si Panoramo nepředplatíte, vrátíte nám výtisk zpět.

ZÁJEMCI o populárně vědecký časopis HOMO KAJ KOSMO nechť se přihlásí svazu. Roční předplatné 40 Kčs. K informaci o vydávání časopisu NORDA PRISMO : předplatitelům na rok 1974 nabízíme vrácení částky 20 Kčs resp. naše esp. materiály. Z dopisu V.Setäly ci-

tujeme :"La iniciatinto de la publikigo de NP...neatendite forlasis nin kaj restigis post si grandan malordon. La subskribinto /V.S./ jam pli ol 80jara ne havas fortojn plenumi ĉion necesan... En la n-ro 2 estas proponata ia kompenso al pagintoj pro la mankantaj numeroj".

V ČASOPISE PACO /ústředním/ je uváděna mylná informace o předplatném a rovněž nesprávná adresa ; předplatné je stále 30 Kčs ročně, adresa svazu Jilská 10, 110 00 Praha 1.

VAŠI KNIHOVNIČKU vhodně doplní nové publikace z VDR /jen v několika málo výtiscích/ k dispozici v ČES. Jsou to : La naciaj malplimultoj en VDR /5 Kčs/, La bambufluto- novelaro el Suda Vjetnamio /10 Kčs/ a Anekdotoj de vojaĝo /5 Kčs/.

L.E.T. LANČOV přijímá již přihlášky na rok 1975 ! Kdo jí pošle do 15.1.75, bude mít pobyt nejlevnější. Denní penze se pohybuje kolem 25-30 Kčs včetně stravy /5x denně/ a kursovného. Vyučování v kursech A-E. Chceme docílit, aby se na obě etapy /13.7-26.7. a 27.7.-9.8./ hlásilo co nejvíce n e e s p e r a n t i s t ů !!!! Je to nejlevnější rekreace /za 490 Kčs/ u nás, pořádaná mimo ROH Propagujte ji ve svém okolí ! Dotazy adresujte přímo EK Třebíč,p. schr.72, 674 01 Třebíč.

DOBROVOLNÉ DARY. R.Kopecká,Kladno-20, C.Prachařová,Gottwaldov - 30, L.Škrna-Chodov,20, M.Cejnarová,Praha-10, P.Marek,Praha-20, Z. Pitrman,Praha-5, J.Urban,Štíty-5, J.David,Pustějov-20,V.Střihavka, Kladno-12, A.Burkot,Gottwaldov-20, F.Mančík,Slavkov-12.Děkujeme.

---

UEA-KOTIZOJ POR 1975 /el la cirkulero de UEA/

La inflacio en la lastaj jaroj tiel rapidiĝis, ke la Estraro neniel povis eviti plian kotizaltigon. Eĉ kun la jam farataj ŝparoj kaj kun la jam akceptita kotizaltigo, la buĝeto de UEA antaŭvidas deficiton de 12 mil gld. en 1975. Krome la Estraro faris sian eblon por preni en konsideron la malfortiĝon de diversaj valutoj kaj plifortiĝon de la aliaj. La nacivalutaj kotizoj estas fiksitaj tiel, ke kvankam ekz. la MA-kotizo en gld. fariĝas 50, el multaj landoj ni ricevos malpli altajn sumojn.Kotizoj por ĈSSR estas : MJ /150Kčs/, MA,MA-K /300/,J-MJ/75/,J-MA/225/
La interesitoj ne sendu la monon antaŭ ol ili estos alvokitaj !

LA ĈEFDELEGITO ADIAŬAS. Mi sciigas al ĉiuj Individuaj membroj de UEA kaj al ties Delegitoj en ĈSSR, ke mi bedaŭrinde rezignas pri la funkcio de laĉefdelegito de UEA pro manko de la vidkapablo. Mi rekomendas kiel mian sekvonton ekde 1975 L.Rýznar el Svitavy. Kun dankoj pro la ĝisnuna bona kunlaboro mi deziras al ĉiuj firman sanon kaj prosperon - kaj en poresperanta laboro kaj en persona vivo.
Sincere salutas vin František Sviták

BELARTAJ KONKURSOJ DE U E A PLIVASTIĜAS. En sia jubilea jaro la Belartaj Konkursoj de UEA /fonditaj en la nuna formo en 1950/ disetendas novajn branĉojn. De multaj jaroj estis kutimaj nur la branĉoj Originala Poezio,Traduka Poezio ka.Nun estas reenkondukitaj la iamaj branĉoj Traduka Prozo kaj Traduka Teatraĵo kaj aldonita FOTOGRAFIO. Konkursaĵoj por la literaturaj branĉoj estu senditaj al la nova sekretario de BK, s-ro A.Venture, 55 Park Hill, Carshalton Surrey SM5, Britio. Limdato : la 31a de marto 1975. Nova estas ankaŭ la prezidanto de la juĝkomisiono : s-ro B.Ragnarsson,Islando, kaj la juĝkomisiono mem estas rekonsistigata.

ST - 17 - 7043/75